



HEROLDO DE UTENA

Informilo de BET- 49, 12-07-2013, vendredo *N-ro* 7

DU HEROLDOJ

La gazetotitolo de BET-49 en la litova urbo Utena “HEROLDO DE UTENA” ŝajnas aludi la titolon de unu el la ĉefaj gazetoj de la Esperanto-movado. Temas pri iam populara gazeto “HEROLDO DE ESPERANTO”. La gazeton fondis Teodor Jung sub la titolo *Esperanto Triumfonta*. Li, kun la milita interrompo, redaktis ĝin ĝis 1961. Poste dum multaj jaroj la gazeton redaktis Ada Fighiera-Sikorska. Post ŝia morto en 1996 la gazeton transprenis Itala Interlingvistika Centro, kiu tuj transdonis ĝin al Kooperativo de *Literatura Foiro*. Praktike *Heroldo de Esperanto* baldaŭ iĝis la organo de la *Esperanta Civito*, organizaĵo pretendanta reprezenti Esperantujon kun civitanoj esperantistoj. La nova redaktorino fariĝis Perla Martinelli. La gazeto estis politike kaj religie sendependa, sed ne tre lojala al agado de UEA. En 2011 komenciĝis grandaj problemoj kun aperado de *Heroldo de Esperanto*. En 2012 *Heroldo de Esperanto*, ho ve, ĉesis aperadi. La *Esperanta Civito* ne plu kapablis eldonadi *Heroldon de Esperanto*. Ŝajnas, ke nun oni esperas ricevi monon, vendinte la gloran nomon al iu nova eldonisto. Ankaŭ *Heroldo de Utena* ĉesos sian aperadon – sabate (la 13-an de julio 2013). Tamen pri tio neniu bedaŭros: tutnature al tiu tempo BET-49 oficiale finos sian vivon.

Oficiala porinforma subtenanto estas la revuo “Ondo de Esperanto”. Tamen ni esperu, ke raportoj pri nia aranĝo aperos ne nur en ĝi, sed ankaŭ en aliaj Esperanto-periodaĵoj. Ekzemple en la seriozaj revuoj “Esperanto”, “Kontakto” ktp.

GRAVE !!!

La 12-an de julio (vendrede) je la 8.30 el la Kolegia akceptejo okazos **senpera dissendo por tuta Litovio pri BET-49**.

La dissenda radiostacio estas „Laisvoji banga“ (Libera ondo). Kelkajn partoprenantojn de BET-49 paroligos ĵurnalisto **Audrys Antanaitis** (Prezidanto de TEĴA).

LA PROGRAMO por la 13-a de julio (sabato)

- 8.00 – 9.00** Matenmanĝo
9.00 – 11.00 Lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj
10.00 – 11.00 Somera universitato. Mikaelo Bronŝtejn “Mi stelojn jungis al revado ...” (aŭd. n-ro 2-08)
11.00 – 12.00 Somera universitato. Aleksander Korĵenkov: “Historio de Esperanto”, prelego 4 (aŭd. n-ro 2-16)
12.00 – 13.00 Prepariĝo al solena fermo de BET-49
13.00– 14.00 Tagmanĝo
14.00 -15.00 **Solena fermo de BET-49** (Muzika lernejo)
15.00 – 16.00 Libera tempo
16.00 – 17.00 Koncerto de Miĥail Povorin (en la ĉefa aŭditorio)
17.00 – 20.00 Libera tempo
20.00 – 21.00 **Adiaŭa vespero.** Gvidas Mikaelo Bronŝtejn (Muzika lernejo)

La 14-an de julio (dimanĉo)

- 8.00 – 9.00** Matenmanĝo
9.00 – 18.00 **Disveturo**

Humphrey Tonkin:

En la Antaŭparolo de la Unua Libro Zamenhof kiel “la plej ĉefajn problemojn, kiujn estis necese solvi” en la kreo de lia internacia lingvo prezentis tri aferojn:

I. Ke la lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante.

II. Ke ĉiu, kiu ellernis tiun ĉi lingvon, povu tuj ĝin uzi por la kompreniĝado kun homoj de diversaj nacioj, tute egale ĉu tiu ĉi lingvo estos akceptita de la mondo kaj trovos multe da adeptoj aŭ ne, – t.e. ke la lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikiĝoj.

III. Trovi rimedojn por venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan – ne kun ŝlosilo en la manoj kaj en okazoj de ekstrema bezono.

Nia intervjuo



Mikaelo Lineckij konata ukraina esperantisto, Esperanto-instruisto, tradukisto

Ĉu vi iam antaŭe estis en BET?

Fakte de BET komenciĝis mia esperantista vivo. Estis la jaro 1971 kaj la 12-a BET en litovia urbo Kretinga.

Komparu la unuan vian BET kaj la nunan.

La unua BET, kiel ĝenerale la unuaj Esperanto-renkontiĝoj, estis la plej impresiva. En mia memoro ĝi restis kiel mia konatiĝo kun Esperanto-mondo, la unua trafo al Esperanto-medio. Mi trafis paroligan kurson de brila instruisto Andreo Rogov. Mi estis ege entuziasmigita. Post tio mi partoprenis ankoraŭ en kelkaj BET. La nuna BET estas sufiĉe tradicia, kun tradicia programo. Ĉio daŭras, preskaŭ nenio neatendita okazas.

Ĉu vi rimarkis iun diferencon inter Litovio tiam kaj nuna?

Mi venis per propra aŭto. Antaŭe estis nenioj limaj problemoj. Nun mi pli ol 3 horoj pasigis ĉe Bjelorusia-Litovia ŝtatlimo. Vice staris multaj aŭtomobiloj. Tio demonstris grandan intereson al Litovio. Interne Litovio iĝis tute alia lando ol tiu de soveta tempo. Ĝi estas pli eŭropa, tute alia lando ol tiam. Nu, Litovio estas Litovio! Ĉiam agrabla.

Vi partoprenis en sufiĉe multe da diversaj Esperanto-aranĝoj. Eble vi rimarkis inter ili ion eksterordinara?

Dume mi nenion eksterordinara renkontis. Ĉiuj tiaj renkontiĝoj estas konstruataj laŭ similaj principoj. Ĝis tagmezo okazas iu ekskurso aŭ prelego, vespere iu kultura programo. Diferencas do nur ekskursaj programoj, ĉar ni ja ekskursas ĉiam al alia loko... Iu eksterordinara okazas tre malofte.

Permesu demandon pri Ukrainio. Ĉu Esperanto en Ukrainio stagnas aŭ antaŭeniras?

Bedaŭrinde mi malfacile trovas bonajn vortojn pri Ukrainia Esperanto-movado. Bedaŭrinde, la movado fariĝis formalisma. Do, formalistoj diras ke formale iuj planoj estas, sed nenio el esperantistoj tion konstatas.

Ĉiujare mi aŭdas raportojn, sed vidas neniujn rezultojn. Nu, tia estas laborstilo de la estraro de nia Asocio.

Sed ni ja estas esperatistoj, ĉu eblas pri pliboniĝo de la stato?

Por plibonigi la staton necesas efektiviĝi gravajn kaj fundamentajn ŝanĝojn en Ukrainia Esperanto-movado. La Asocio estas fondita en 1989. La vivo multe ŝanĝiĝis nur nenio ŝanĝiĝis en la movado, en laborstilo de la Asocio.

Ĉu ni sukcesas eluzi internaciajn Esperanto-aranĝojn?

Ne akceptu miajn vortojn kiel kritiko, sed kiel konsilo ĉiam ion plibonigi. Jen dum ĉi tiu BET, mi memoras ankaŭ dum aliaj BET, estis renkontiĝo kun gvidantoj de loka komunumo. Nun kun urbestro kaj vicurbestro. Tre agrable, tiuj gvidantoj ekscias pri Esperanto. Sed ĉu lokuloj sentas iujn signojn de fluanta esperantista vivo? Jen BET estas grava internacia aranĝo, sed kial ne pendas Esperanto-standardo ĉe la eniro? Kial? Vi skribis super la eniro "bonvenon", sed kion tio diras al la urbanoj? Devas esti kontaktoj, renkontiĝoj kun loka publiko. Necesas renkontiĝi kun lokaj homoj denove kaj denove. Eble eĉ speciale instrui al ili Esperanton. Ne nur BET-oj, ankaŭ aliaj aranĝoj devas havi publikecon! Nur tiam ni povas esperi, ke Esperanto progresos. Sen tio Esperanto restos por limigita kvanto de homoj, kiuj plezure renkontiĝas, ĉirkaŭbrakas, interkisas kaj ĉio!

TRI PRELEGOJ DE ED ROBERTSON

Eĉ tri prelegojn dum tiu ĉi BET ni povis aŭdi de skota esperantisto Ed Robertson kaj ĉiuj tri prelegoj allogis grandan kvanton de partoprenantoj.

Por litovoj tre interesa estis la prelego pri historio kaj nuna situacio de Skotlando, ĉar la ideo pri sendependiĝo neniun litovon povas lasi indifera kaj ĝenerale pri la historio de tiu ekzotika lando ni ne multon scias.

La dua prelego instruis kiel deĉifri nekonatan lingvon kaj evidentiĝis ke tio estas ege malfacila kaj temporaba vojo kaj ke abundas ankoraŭ tekstoj trovitaj sur la ŝtonoj kiujn oni ne povas tralegi. Mi persone post prelego al komence donita demando de Ed "kion fari, se fosante la ĝardenon vi trovas ŝtonon kun ne konata subskribo" post prelego konkludis, ke mi prefere denove enfokus ĝin.

La tria prelego levis la demandon: Kion signifas pralingavo? Prezente la ŝanĝojn leksikajn, morfologiajn, fonetikajn, donante diversajn komparojn la preleganto skizis kiel lingvoj dum jaroj ŝanĝiĝas kaj kiel retroirante en tempo eblas malkovri la vojon de la ŝanĝoj.

Koran dankon al Ed pro vere universitatem nivela prelego kaj ni kredas, ke li refoje revenos al BET por klerigi nin kaj por ĝui kun ni amikan kunestadon!

FASCINA KONCERTO DE EMANUELE

Merkrede (la 10-an de julio) sur subĉiela scenejo apud la urba lago Dauniškis, por la urba kaj BET-publiko longan koncertan feston prezentis Emanuele Rovere el Italio. Estas esperantisto, amatora muzikisto, progresanta en kantplenumo kaj jam atinginta nivelon de profesia kantisto. En lia plenumo sonis diversaj popularaj (kelkaj propraj) leĝeraj melodioj. Ĉefe amtemaj, sed ankaŭ kelkaj socitemaj. Ŝajnas, ĉiuj kantotekstoj estis en la traduko aŭ libera interpreto de la kantisto mem.

Multaj esperantistaj kantistoj pekas pri neklara prononcado de kantvortoj. Emanuelo meritas laŭdon: Ne nur bela voĉo, sed ankaŭ perfekta prononco! Postuloj al kantisto, kiu pretendas esti samnivela al profesiaj plenumantoj devas esti pli altaj, ol al ordinaraj amatoraj kantistoj.

Aŭskultanto neprofesia muzike apenaŭ povus trovi iujn mankojn en la plenumado de Emanuelo – la sonregistrado estis farita altnivele. Vere, kelkajn iritas ne “viva” sonregistrita koncertado. Nu, nun tre nemultaj kantistoj kantas “vive”. La koncerto de Emanuelo ne estis escepto. Gravus ke al la publiko la koncerto plaĉis! Tio, ke kelkaj kantoj ne estis taŭgaj por la elkora voĉo de Emanuelo, tio ke multaj kantoj laŭstile similis unu al alia tute ne difektis la ĝenerale agrablan impreson. Multaj ŝatis aŭdi konatajn kanzonojn en Esperanto. Malgraŭ iom longa koncerto, malfrua tempo kaj malvarmiĝinta vetero oni restis kaj ĝuis la koncerton ĝisfine.

Porfine necesas kelkvorte tuŝi la kantotekstojn. Lingve ili estis senriproĉaj, tamen tro liberaj enhave kaj ofte pli prozaj ol poeziaj. Estas do la tereno, kie la ĉarma kantisto Emanuele Rovere povas plie progresi. Dankon al li pro ĝojigo de la aŭskultantaro kaj bonega prezento de la lingvo Esperanto.

Aŭskultintoj

Kia mirindaĵo

Kia mirindaĵo estas tio, ke sur la bela trankvila bordo de la enurba lago de Utena hieraŭ BET-anoj kaj urbanoj ĝuis mondfamajn melodiojn kaj tre mildan voĉon de la itala amiko Emanuele!

Vere belsonis kantoj, esperantigitaj de li. Multaj homoj kun ridetoj, mansvingoj, aplaŭdoj atente aŭskultis pli ol duhoran koncerton, fojfojajn komentojn de la ĉarma kantisto pri kantoj kaj Esperanto, eĉ ne timante vesperan malvarmeton kun kuloj. Dancis akvofontano, kaj Emanuele "kvazaŭ kolombo" blankhara provokis virinan aŭskultantaron - "Kisu min, kisu min multe". Ho, kiu povus kontraŭstari tian varman koron.

Ŝajne belaj utenaninoj aŭ esperantistinoj dum lastaj tagoj jam sufiĉe turmentis lian voĉon, ĉar tiu ĉi koncerto okazis laŭ "karaoke"-metodo. Mi tamen preferus ekaŭdi vivan, se eĉ ege mallongan koncerton, tamen kun ĉi-momenta sentesprimo de la artisto...

Vida Ĉojiene



Fotoj de Taesok Choe



LATVIA NAJTINGALO

Lunde potagmeze la prelego de Margarita Želve plenigis la salonon per personoj kiuj volis aŭdi pri la vivo kaj verkado de latva poetino Liudmila Jevsejeva. Kvankam estis tro malmulte da tempo por vidi kaj aŭdi ĉion kion prelegantino Margarita preparis, ŝi lerte gvidis nin tra la vivo de tiu ne ordinara virino. Pro egzilo, malforta sano kaj troa laboro ŝia sorto ne estis enviinda, sed Ludmila tre aktiva esperantistino kaj tre bona poetino. Dum la tuta prelego ni sentis, ke ni intimiĝas kun unu el legendoj de latva movado.

Fine de la prelego latvino Lolita Medina inspirita de bona etoso spontanee prezentis al ni infanan versetoj de Ludmila Jevsejeva tiu deklamado sur la tablo vere estis kiel ĉerizo sur la kuko.

Margarita tiel bone preparis la prelegon kaj tiel flue prezentis ĝin, ke ni povas nur bedaŭri ke ne restis tempo por poemoj de poetino kaj esperi ke en aliaj BEToj ni aŭdos ŝiajn pliajn prelegojn pri eminentaj latvaj esperantistoj.

Gražina Opulskienė

Anekdotoj

prezentitaj de **Mikaelo Lineckij**

Tute novbakita kuracisto la unuan fojon gvidis akuŝon. Kiam ĉio finiĝis, li demandas opinion de profesoro pri siaj agoj. La profesoro ridetis:

– Por la komenco estas tre nemalbone... Tamen por la estonto memorfiksu, ke frapeti necesas postafeton de la infano, sed ne tiun de la patrino...

Ĉe psikiatro.

– Sinjoro kuracisto, al mi ĉiunokte el sub la lito venas iu monstro. Kion mi faru?

– Vi sendu ĝin ien.

Nokte el sub lito de la kuracisto elrampas iu monstro, kiu diras:

– Pardonu, sinjoro kuracisto, sed oni min sendis al vi...

– Mi rekomendas por Via edzo plenan trankvilon kaj kvieton. Jen estas recepto por dormigilo.

– Kiam li devas komenci gluti la tablojdojn?

– Ho ne. Tiuj tablojdoj estas destinitaj por Vi.

En la retejo de Litova Esperanto-Asocio

<http://www.esperanto.lt> jam legeblas ankaŭ la 5-a numero de la Heroldo de Esperanto :

http://www.esperanto.lt/board/data/BET49/HEROLDO_5.pdf

En la sama retejo vi povas trovi kaj kopii por vi la **komunan foton** de partoprenantoj, ankaŭ kelkajn aliajn fotojn el la vivo de BET-49.

Vetera prognozo Por la 14-a de julio (dimanĉo)

Serenaj mateno kaj tago, vespero pluveta.

Temperaturo tage +20-22°C

Jelgava – urbo de nia jubilea BET

La jubileajn 50-aj Baltiaj Esperanto Tagoj dum kiuj ni celebros la oran jubileon de tiuj-ĉi aranĝoj okazos ekde 28-a de junio ĝis la 4-a de julio 2014 en Jelgava – la kvara plej granda urbo de Latvio (≈ 63 mil da loĝantoj).

Ĝi situas en centra parto de la Latvio en la Zemgale ebenaĵo ĉe la rivero Lielupe je distanco 42 km for de Rigo, 295 km for de Vilnius kaj 350 km for de Tallinn. Jelgava estas la ĝemelurbo de Pärnu (Estonio), Šiauliai (Litovio), Bjalistoko (Pollando), Hellefors (Svedio), Magadano (Rusio), Berlino (Germanio) kaj de multaj aliaj. Jelgava estas moderna urbo, ankaŭ urbo de studentoj ĉar ĉi-tie situas Universitato pri Agrikulturo en kies komfortaj studentaj hosteloj loĝos partoprenantoj de BET-50.

Bonvenon al Latvio! Bonvenon al nia ora BET!



Margarita Želve
Prezidantino de Litova Esperanto-Asocio



En redaktejo de Heroldo de Utena

Verku kaj fotu por *HdeU*!

Redaktoro

Vytautas Šilas,

+370 611 75500

vilnastelo@yahoo.lt